No. 2.

# BULTENO

1933.
(Aperis 3. VI. 1933)

## DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

*Redakcio kaj administracio:*
*Praha XIX., Uralské nám, 447.*
*Telefona n-ro 718-41.*

*Redaktas:*
*Dr. ST. KAMARYT*
*Dr. A. PITLÍK*

*Senpage por membroj de*
*Ĉs. Asocio Esperantista.*
*Aperas sesfoje dum la jaro.*

## TASKO PLENUMOTA ANKORAŬ ANTAŬ LA SOMERA RIPOZO!

Niaj membroj scias, ke en Hradec Králové ni decidis firmigi nian organizon tiamaniere, ke ĉiuj lokaj grupoj, kluboj kaj rondetoj, organizeblaj laŭ kvanto, fariĝu niaj membroj korporacie. Tio signifas, ke ekzistu en la loka grupo neniu ano, kiu ne estus samtempe ankaŭ ano de ĈAE. Por helpi al efektivigo de tiu organiza idealo ni eĉ malaltigis por la grupaj membroj la kotizon. La grupoj pagas por siaj membroj en jaro 1933 sole **10** Kč anstataŭ 16 Kč. Kompreneble ili estas egalrajtaj membroj kaj ankaŭ ricevas senpere de ni nian Bultenon senpage.

Estas kuraĝiga simptomo, ke ni hodiaŭ povas anonci, ke ĝis mezo de majo 1933 aliĝis al tiu aranĝo jam sep kluboj en la respubliko, inter ili la plej grava kaj potenca la Esperantista klubo en Praha. La grupoj aliĝintaj korporacie ĝis nun estas en jenaj lokoj: **Bakov n. J., Bratislava, Hradec Králové, Kolín, Košice, Mladá Boleslav, Praha.** En pluaj lokoj preparoj por decido daŭras.

Ni informas niajn amikojn kun sincera ĝojo pri tiuj ĉi faktoj kaj petas multajn el ili amike kaj afable, ke ili klopodu en ĉiu loko, kie estas organizebla nombro de esperantistoj, decidigi la lokan grupon pri korporacia aliĝo al nia Asocio. Organizebla nombro signifas ekziston de almenaŭ 8 esperantistoj, kiuj povas pagi monate almenaŭ po 1·50—2 Kč. Tia ebleco ekzistas **en** preskaŭ **ĉiu** loko. Oni kompreneble devas turni sin al medio finance taŭga. Ni ricevas ofte leterojn kortuŝajn. Ni legas pri samideanoj, kiuj pene, penege ŝparas 2 Kĉ dum la jaro por doni tiun sumeton kiel jara kotizo al la loka „klubo". Tiuj samideanoj meritus, ke ni kisu iliajn manojn. Jen la vidvina groŝeto! Sed preni de tiuj ĉi oferemaj idealistoj iliajn helerojn estas peko kontraŭ ilia fido je la homa justeco. Ne estas ilia kulpo, ke ili devas vivi en tiu ĉi mal-idilia epoko. Sed estos devo de ni ceteraj, ke ni ebligu al ilia fervoro kunlabori kiel nepagantaj anoj en efektiva klubo aŭ societo! Neniu pruvos al ni, ke povas ekzisti deca laborkapabla klubo el anoj, kiuj nekapablas pagi pojare pli ol 2 aŭ 4 kronojn!

Jen, amikoj, nova urĝa tasko! Klopodu, ke ankaŭ en lokoj, kie ĝis nun ne ekzistas, baldaŭ estiĝu grupo, kiu estas efektiva klubo, efektiva societo, kiu estos taŭga por kolekti la membrajn kotizojn kaj por membrigi ĉiujn siajn anojn ĉe ĈAE!

La monato junio, kiam estas finintaj jam ĉiuj sezonaj entreprenoj, tre taŭgas por zorgi pri taskoj organizaj. Amikoj, samideanoj, kunlaborantoj! Ne forgesu ie, kie estas iom da ebleco, tiun ĉi gravan taskon! Turnu vin al nia komitatano J. Friedrich en Košice, Jarná 13, kiu prenis sur sin tiun ĉi malfacilan, sed meritplenan taskon.

*Stan. Kamaryt.*

## NIA TERMOMETRO:

| Por la jaro<br>pagis dum la jaro: | 1930 | 1931 | 1932 | 1933 | 1934 |
|---|---|---|---|---|---|
| 1930 | 172 | 117 | 1 | — | — |
| 1931 | 56 | 216 | 112 | — | — |
| 1932 | 2 | 13 | 253 | 62 | 2 |
| 1933 (ĝis fino de aprilo) | 1 | 1 | 12 | 153 | — |
| | 231 | 347 | 378 | 215 | 2 |

Niaj amikoj estas petataj sekvi en ĉiu numero de la Bulteno niajn ciferojn, kiuj montros, kiom da esperantistoj en nia lando komprenas la necesecon per sia kotizo subteni la agadon de sia nacia centro. Skl.

## Al ĉiuj esperantistaj grupoj,

### al ĉiuj UEA-Delegitoj kaj al ĉiuj aktivaj samideanoj en Ĉeĥoslovaka respubliko.

Tre ŝatataj kunlaborantoj!

Per ĉi tiu alvoko ni intencas turni nin al kiom eble plej vasta rondo de nia komunumo, ĉar temas pri entrepreno de eksterordinara signifo, kiu alportos al nia movado gravan utilon, se ni sukcesos fari ĝin laŭ sufiĉe granda skalo.

Ni ricevis de la fervoja ministerio permeson lokigi en ĉiuj stacidomoj de la respubliko nian afiŝon por la plej malalta formala depago. Post venko de diversaj malfacilaĵoj ni povos nun grandstile uzi ĉi tiun permeson, se ni trovos vian komprenon. Ni intencas disvastigi ladajn tabulojn proksimume 42x30 cm kun verda stelo, la vorto Esperanto kaj mallonga surskribo. Estos sur la tabulo ankaŭ spaco por enmeti la adreson de loka Delegito, indikon pri kunveno de la grupo aŭ adreson de persono, povanta doni informojn pri niaj lingvo kaj movado.

Zorgu ĉiuj, ke tiuj tabuloj baldaŭ pendu en 1000 stacidomoj de nia respubliko. Ni petas vin: se vi estas grupo, mendu tiun tabulon de ni je via risko. Se vi estas izolulo, kolektu inter esperantistoj de via loko la necesan sumon, por ke vi povu pagi la tabulon. Iuj grupoj aŭ Delegitoj povos kompreneble provizi ankaŭ plurajn stacidomojn. Kun via mendo, kiun faru plej rapide kaj laŭ suba formulo, bonvolu al ni sendi Kč 26·— por 1 tabulo. Ni liveros por tiu sumo rekte en vian stacidomon la tabulon kun via surskribita adreso, zorgos mem pri ĝia fikso en via stacidomo kaj antaŭpagos ĝis fino de la jaro 1934 la sumon por ĝia lokigo. Via plua devo estos nur pagi al ni sen atentigo regule ĉiujare en oktobro Kč 6·— (unuan fojon en oktobro 1934 por la jaro 1935). La efektivigo okazos tuj, kiam ni havos kontentigan nombron da aliĝoj.

Pripensu, karaj samideanoj, la efekton, kiu rezultos el la fakto, se post nelonga tempo sur milo da stacidomoj pendos nia afiŝo kun stelo. Tial neniu inter vi restu indiferenta al ĉi tiu iniciato! Faru ĉiun eblon, ke la tabulo en via loko estu plej baldaŭ kaj skribu al ni tuj!

Dankante anticipe ni salutas vin samideane:

Komitato de ĈAE. Komisiito O. Ginz.

### *Mendilo. Al Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, Praha XIX., Uralské nám. 447.*

*Mi mendas por la stacidomo(j)..............................*

*........... tabulo(j)n po Kč 26·— kaj mi sendas la sumon de............... Kč............... per poŝta blankopagilo al la konto n-ro 9602 de Svaz československých esperantistů, Praha.*

*Adreso surskribota (plej koncize):..............................*

*..............................................................*

*Mi deklaras, ke mi ĉiujare ĝis fino de oktobro — unuan fojon en la jaro 1934 — pagos Kč 6·— por ĉiu mendita tabulo. Mi anoncos plej malfrue ĝis 1-a de septembro, se mi ne deziros dum venonta jaro havi la tabulon en la stacidomo.*

*Mi mendas krome por (alia celo: sidejo de la klubo, loĝejo de Delegito k. s.)..............................*

*........... tabulojn kun malplena adresa spaco afrankite po Kč 15·— kaj mi sendas sammaniere la sumon de ...................... Kč.......................*

*En .............................. la .............................. 1933.*

*Subskribo, eventuale kun kluba stampo.*

*..............................................................*

---

## Ĉeĥoslovaka antologio.

*La cirkuleron, siatempe dissenditan al 125 personoj, respondis 12 gesamideanoj.*

*Tuj post solvo de la aŭtorrajta demando ni starigos la definitivan planon kaj dissendos la ĉeĥajn tekstojn al tiuj, kiuj esprimis sin pretaj partopreni en la tradukado.*

*Ni invitas ankoraŭ tiun ĉi fojon ĉiujn membrojn de ĈAE, kiuj volas esti kunlaborantoj, sed ĝis nun ne aliĝis, ke ili afable informu nin pri sia preteco, por ke ni havu definitivan rondon de tradukantoj.*

*Ĉiun korespondaĵon, kiu rilatas al la Ĉsl. antologio, direktu al ĈAE aŭ senpere al Rud. Hromada, Praha VII., Sochařská 333.*

---

## Gazeta servo de ĈAE.

### Alvoko al ĉiuj kunlaborantoj de G. S.

En fino de 1932 ni interkonsentis pliampleksigi nian laboron. Enpenetri ankaŭ en gazetojn ĝis nun silentintajn pri Esperanto kaj paroli tiel al novaj miloj da varbotoj. Ni alvokis tiam: „205 gazetoj ĉeĥoslovakaj sciis pri ni en 1931. Kiom da ili estos en 1932?“

Ni plenumis la taskon sukcesinte trovi en novaj lokoj kunlaborantojn. Hodiaŭ kuŝas antaŭ ni kolekto el 227 gazetoj pasintjaraj. Kresko 10-procenta.

Tamen rigardu ĉiujn sekvantajn ciferojn kaj komparu ilin kun la rezultoj pasintjaraj, kiujn ni notis inter krampoj.

| Represis | | | | artikolojn |
|---|---|---|---|---|
| 77 | (71) | gazetoj | en Praha . . . . . . . | 467 (443) |
| 65 | (66) | „ | en cetera Bohemio . . . . | 229 (336) |
| 48 | (45) | „ | en Moravio-Silezio . . . | 212 (286) |
| 24 | (15) | „ | en Slovakio k. Subk. Rusio | 141 (102) |
| 13 | (8) | „ | ĉeĥosl. ekster respubliko . | 40 (61) |
| 227 | (205) | gazetoj | artikolojn | 1089 (1228) |

Vi trovos, ke la sumo de kolektitaj artikoloj estis ĉie malpli granda kun honora escepto de Praha kaj de Slovakio.

Serĉu klarigon! Ĝi ne estas malsimpla. Sendube la gvidantoj iom tro zorgis pri plenumo de la plano: eniri en novajn lokojn. Estis ja grave trovi novajn elirejojn al nova publiko. La pasintjarajn poziciojn ni konsideris jam firmaj kaj ne sufiĉe ilin atentis. Montriĝis, ke necesas tiu atento. Ni ne kuraĝas diri, ke niaj malnovaj batalantoj laciĝis en tiu ĉi agrabla laboro. Ĝojiga ĝi ja estas, ĉar ni vidas ĝiajn fruktojn — ekstreman kreskon de la intereso por nia afero en Ĉeĥoslovakujo.

Sekvi gazetojn depost longe al ni amikajn ni tamen nun ne volas. Sufiĉos eble nur pli diligenta kontrolo de la rezultoj, kiuj estis eble eĉ eminentaj, sed ni ne ricevis pruvojn pri tio. Certe la pli grava parto de la laboro estos farita per la represo, tamen por gvido de la laboro kaj por la statistiko estas tre necesa ricevo de la koncerna gazetnumero aŭ de la eltranĉita artikolo. Bonvolu nin subteni ankaŭ en tiu ĉi rilato!

Laŭ sperto ni varme konsilas represigi la artikolojn poparte, eventuale eĉ unuope. Tiel vi longe havos materialon por via(j) gazeto(j) kaj kredu, ke ofte malgranda artikolo enmetita inter la ceterajn gazetajn sciigojn, almenaŭ samon valoras kiel granda rubriko kun la surskribo „Esperanto“. Ĉu vi ne trovas, ke tia titolo iam eĉ povas instigi la neinteresiĝantan publikon al nelego?

### Kion volas la gazeta servo de ĈAE?

Konsiderante la konatan fakton, ke la gazetaro kreas nun grandparte la publikan opinion, la Gazeta Servo de ĈAE deziras atingi, ke ĉiuj gazetoj de nia ŝtato estu informitaj pri nia movado kaj regule raportu pri ĝi. Viglaj ĉeĥoslovakaj esperantistoj estas kore invitataj al kunlaboro. La tasko estas plej interesa kaj tre facile plenumebla.

Skribu al G. S., en kiu gazeto vi volas kunlabori, kaj vi ricevos detalan klarigon pri via tasko kaj poste regule ĉiujn sciigojn de G. S. Adreso: Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, Gazeta Servo, Praha XIX., Uralské nám. 447. O. Ginz.

---

## Ĉeĥoslovaka gazetaro pri Esperanto.

Estas nur malgranda elekto el la kunvenintaj artikoloj. La ĉiam kreskanta intereso por nia afero ĉe la gazetaro permesas nur plej koncizan citon sur ĉi tiu loko kaj ĉiam certe mankos gravaj publikaĵoj. Granda parto pro la nesufiĉa spaco, alia granda parto pro tio, ke ĝi ne venis antaŭ niajn okulojn. Denove ni petas niajn membrojn, ke ili al ni sendadu regule ĉion, kion ili legas pri internacia lingvo en ĉeĥoslovakaj gazetoj. Ĉiu artikolo estos utiligita, eĉ se ni ne parolos pri ĝi ĉi tie.

Ĝenerala kunveno de ĈAE: Národní Politika 11. III., Národní Osvobození 15. III., Národní večerník 15. III., Pondělí Národních listů 20. III., en Hradec Králové Osvěta lidu 4., 11., 18., 22. III., Nová pochodeň 16. III., Rozhledy 10., 17. III., Kraj královéhradecký 18., 25. III., ankaŭ Večerník Českého Slova en Hradec Králové 15. III.

Prelega vojaĝo de la negra samideano Ajayi: Nová Doba — Plzeň 5., 14. V., Český deník — Plzeň 6. V., Gemer Malohont — Rim. Sobota 29. IV., Slovák — Bratislava 30. IV., 7. V., Slovenská Politika — Bratislava 7., 9. V., Slovenský Deník — Bratislava 5. V., Slovenský ľud — Košice 10. V., Slovenský východ — Košice 30. IV„ en Brno Lidové noviny 8. V. kaj Den 9. V.

Ĉeĥoslovaka numero de Literatura Mondo: Salon 2. I., Pražské noviny 12. I., České listy — Ml. Boleslav 27. I., Venkov 9. II., Národnie noviny — Turč. Sv. Martin 8. III., Ludová Politika — Bratislava 15. III., Nové Slovensko — Trnava 18. III., Podkarpatské hlasy — Užhorod 29. III., Břeclavský kraj — Břeclav 15. IV.

Informo pri kursoj de nia lingvo: en Praha Rudé Právo 4. I., Národní Politika 9. I., 19. IV., Večer 24. I., en Bohumín České slovo 24. I., en Brno Moravské noviny 16., 18., 20. III., Lidové noviny 21. III., en České Budějovice Stráž lidu, en Kladno Středočeský živnostník 14. I., en Mor. Ostrava Dělnický deník 7. II., Moravský večerník 7. II., Pozor 7. II., České slovo 8. II., Našinec 10. II., en Plzeň Nová

Doba 4. XII., 25. I. 14., 17., 18., 23., 25., 26. II. 5., 10. III. 9., 29. IV. 3., V., en Prostějov Hlas lidu 9. II., en Prešov Šariš 11. II., en Rimavská Sobota Gemer-Malohont 21. I., en Užhorod Hlas východu 19. I., en Znojmo Moravský Jih 13. I.

Tradukoj el Esperanto: Národní osvobození 23. IV., Lidové listy 8. IV., Národní listy 6. V., Dělnický deník — Moravská Ostrava 10. V.

Laŭ informo ricevita havas la porinfana gazeto Květy mládí konstantan esperantan rubrikon. Kiu al ni liveros pruvon?

---

## Prelegvojaĝo de nigra esperantisto Kola Ajayi.

Ĉs. asocio esp. invitis negron s-on Kola Ajayi (Aĵaji) al prelegvojaĝo tra nia respubliko kaj finance kaj morale ebligis liajn paroladojn, kiuj estis organizataj en pluraj lokoj de nia lando. S-o Kola Ajayi devenas el Lagos en Suda Nigerio en Afriko. Li estas ano de negra gento Joruba kaj li paroladas pri Afriko, sia sunhela patrujo. Sian paroladon li akompanas per belaj lumbildoj kaj krome li kantas tipajn kantojn de sia popolo en la gepatra joruba lingvo. Paroladoj de s-o Ajayi vekis ĉie tre multe da intereso kaj alportis grandajn, kelkloke eĉ grandiozajn sukcesojn.

Ĝis nun okazis prelegoj en jenaj lokoj: Košice: publika, lerneja kaj en radio, Tisovec unu, Rimavská Sobota du prelegoj, Trnava unu, Bratislava unu, Brno du; Uherský Ostroh, Uherské Hradiště, Kopřivnice, Moravská Ostrava, Slezská Ostrava, Radvanice po unu. Pliaj paroladoj okazis en Praha (publika kaj en radio), Hradec Králové, Bakov n. Jiz., Mladá Boleslav, Pardubice, Plzeň, České Budějovice kaj Postoloprty.

En la venonta numero de Bulteno ni donos detalan raporton pri la prelegciklo, kiun ni organizis, kaj tiujn lokojn, kiujn ni pro malfrua aliĝo ne povis nun kontentigi, ni atentigas, ke ni intencas aranĝi duan prelegciklon, post kiam s-ro Ajayi revenos el Balkanaj landoj, kien li nun veturas. La ceterajn lokojn, klubojn kaj laboremajn unuopulojn, kiuj tiunĉi foje ne povis aŭ hezitis inviti s-on Ajayi, ni atentigas pri tiu ĉi ebleco ne perdi tiel maloftan okazon por unika propagando de nia afero per tiel bela parolado, kia estas tiu de s-o Ajayi. Ili baldaŭ ekrilatiĝu kun ĈAE, ke ni povu bone prepari la duan prelegvojaĝon, kiu verŝajne okazos aŭtune. Šustr.

---

## Protokolo
### de la II-a komitata kunveno de ĈAE

okazinta la 11. V. 1933 en Praha, kafejo Louvre. Ĉeestis: Janda, Hromada, Dr. Pitlík, Slavík, Staněk F., Staněk M., Šustr, Tarantíková, Votrubec. Senkulpigis sin: Echtner, Dr. Fousek, Kožený, Vondroušek. Leterojn sendis: Friedrich, Dr. Kamaryt. Prezidis Dr. Pitlík, protokolis Tarantíková.

*Protokolo de la I-a kom. kunveno.* Estis laŭ atentigo de s-o Hromada korektita punkto 18, ke s-o Hromada ŝuldas al la E. S. Olomouc kaj ne male. — Ĉsl. esp. instituto ne povis plenumi pro financaj kaŭzoj la deziron de E. K. Mor. Ostrava, pruntedoni necesajn librojn por preparo al la ŝtata ekzameno. — La somera kurso de ĈEI por kandidatoj de ŝt. ekzameno ne estas ankoraŭ definitive decidita.

*Konferenco de UFE en Ĝenevo,* la 20., 21. V. ĈAE ne sendos delegiton, nek delegos iun ĉeestanton. La komitato decidis letere atentigi denove ICK pri la rezolucio de la ĝen. kunveno en Hradec Králové, esprimante la esperon, ke la konferenco alportos klariĝon de la situacio en intereso de la internacia esperanto-movado.

*Kunlaboro de esp. organizoj de la malgrandaj ŝtatoj.* Estis akceptita simpatie la propono je kunlaboro de esp. organizoj de malgrandaj ŝtatoj. ĈAE rekomendas pritrakti detale la aferon kaj disvastigi la kunlaboron je organizoj de balkanaj kaj baltaj ŝtatoj. La kunlaboro estas precipe nun necesega, kiam esp. organizaĵoj de grandaj ŝtatoj nedemokratie penas solvi la reorganizan aferon, malatentante dezirojn kaj bezonojn de esp. organizoj de malgrandaj ŝtatoj.

*Asocia Bulteno.* La 1-a numero estis dissendita al ĉiuj membroj pagintaj almenaŭ por 1932, al ĉiuj esperanto-gazetoj kaj al ĉiuj membroj de E. K. Praha. La komitato aprobis la kalkulon de presejo. La prezidanto proponas aperigi la 2-an numeron fine de majo kaj la sekvontan komence de julio.

*Fondo de Asocia biblioteko.* Pro financaj kaŭzoj ne estas eble nuntempe la proponon efektivigi. Komitato sekvos la aferon.

*Prelegoj radiaj.* Al la artikolo en n-ro 5 de Ligilo la komitato konstatas, ke la enhavo de la unuaj tri linioj estas malĝusta kaj la riproĉo maljusta, kaj malaprobas ĉi tian manieron de priesperanta informado. La penadon de la esperantistoj de Praha kaj la publike konatan sukceson de iliaj paroladoj en eksterlanda gazetaro oni ankaŭ dankas, ke esperanto en radio venkis ne sole en eksterlando, sed precipe en ČSR. (Ekz. Dr. Pitlík jam en 1923 havis la unuajn radioparoladojn peresperantajn en la mondo, s-o Ginz estas aŭtoro de esperantaj radioverkoj kaj radia fakekstro de ĈAE, s-o Eiselt jam 1928 gvidis radio-esperantan kurson, f-ino Šupichová krom la nomitoj kelkfoje radie paroladis, ktp.) Precipe pro la esp. radioaranĝoj en Brno ne okazas esp. radioentreprenoj en Praha, kie oni estus memkompreneble kapabla laŭforme kaj laŭenhave aranĝi prezentadojn unuarangajn.

*Ĉeĥoslovaka antologio.* S-o Hromada raportas detale pri la ĝisnuna laboro. Al antaŭ du jaroj dissenditaj 125 demandleteroj venis 12 respondoj. Decidite: 1) aĉeti libron „Výbor krásné prózy čsl.“ kiel helpilon al la

elekto de tradukotaj verkoj por antologio, 2) plivastigi la priliteraturan enhavon je artikoloj kaj reproduktaĵoj, rilatantaj al ĉsl. belarto, 3) akcepti la proponon de s-o Bleier, eldonanto de Literatura Mondo, eldoni ĉsl. antologion kondiĉe, ke ĝi ne kaŭzos al ĈAE elspezojn.

*Vojaĝo de Kola Ajayi.* S-o Šustr raportas detale pri la plano de vojaĝo kaj la ĝisnunaj, ĉie sukcesintaj prelegoj. En Praha li publike prelegos la 20. V. kaj la 21. V. je la 22·15 horo kantos negrajn kantojn en Radio Praha, akompanatajn per la klarigoj de Dro Pitlík. La komitato dankas al s-o Šustr pro ampleksa laboro kun la afero.

*Stato de membroj.* Laŭ raporto de kasisto ĝis la fino de aprilo pagis kotizon 215 membroj por la jaro 1933.

*Slovakaj propagandiloj.* S-o Friedrich en Košice, komisiita de la prezidanto, dissendis al ĉiuj esp. grupoj kaj UEA-delegitoj en Slovakujo cirkulerojn kun mendilo pri subskribcio al slovaklingva flugfolio „Jeden jazyk“ kaj slovaka ŝlosilo.

*Kalkuloj.* Estis aprobitaj elspezoj de sekretariejo de 1. III.—6. V. kaj la kostoj de riparo de asocia skribmaŝino.

*Aliĝoj de kluboj al ĈAE.* Laŭ raporto de s-o Friedrich la kluboj en Bakov, Kolín kaj Praha decidis aniĝi ĉiujn membrojn al Asocio. Pasintjare faris simile kluboj en Bratislava kaj Mladá Boleslav. Decidoj el aliaj lokoj estas atendataj.

---

## Universala Esperanto-Asocio

**1908—1933.**

Ĉi jare festas Universala Esperanto-Asocio kvaron-jarcenton de sia ekzisto.

Dum la krizo, kaŭzita per apero de Ido, kaj ĉar montriĝis, ke ne sufiĉas sole propagandi la scion de Esperanto, sed ke estas necese per ĝia aplikado konvinki la neesperantistojn, direktodonajn lokojn kaj influajn personojn pri la taŭgeco de esperanto kiel helpa lingvo internacia, estis en la j. 1908 laŭ iniciato de Hector Hodler en Ĝenevo fondita Universala Esperanto-Asocio, kies unua prezidanto estis Anglo H. B. Mudie. Dro Zamenhof dum la V-a en Barcelona UEA-on karakterizis jene: „UEA unuigas ne ĉiujn esperantistojn, sed ĉiujn esperantismanojn, tio estas ĉiujn tiujn homojn, kiuj konsideras ne nur esperanton en ĝia ekstera lingva formo, sed ankaŭ ĝian internan ideon. Oni ĉie komprenas, ke UEA liveras taŭgan neŭtralan fundamenton por ĉiuj interhomaj interrilatoj kaj servoj, kaj el tiu ĉi reciproka sinhelpado rezultos pli da amikeco kaj estimo inter la gentoj kaj foriĝos la baroj, kiuj malhelpas ilian pacan interkomunikiĝon. En tiu ĉi principo kuŝas la ĉefa graveco de UEA. Mi de UEA atendas multe da bono por nia afero kaj tutkore esperas, ke UEA faros ĉiam pli gravajn progresojn kaj per sia rapida plifortikiĝo nin ŝovos antaŭen al la baldaŭa realigo de esperantismo.“ La Majstro, kiu akceptis honoran prezidantecon de UEA, ĝis sia morto konservis amikajn interrilatojn kun UEA.

La esperoj de Zamenhof, rilatantaj al UEA, ne estis ĝis hodiaŭ trompitaj. Esperanto, ĝiaj sukcesoj kaj UEA estas tiel firme kunligitaj, ke la jubileon de UEA festas simpatie kaj dankeme ĉiuj veraj esperantistoj. Dr. Pitlík.

---

## KRONIKO ESPERANTISTA EN ĈSR.

**Praha.** Ŝtataj ekzamenoj pri Esperanto okazis en Praha la 6., 21. kaj 22. IV. antaŭ la ŝtata ekzamena komisiono por lernejoj komunaj kaj burĝaj. Anoncis sin la jenaj gekandidatoj: Echtner V., Echtnerová A., Fox J., Gajdoš V., Koutek K., Kratochvílová R., Smejkal B. kaj Staněk F., ĉiuj el Praha, Gabryš J. el Lazy kaj instr. Kalivoda K. el Kamenický Šenov. La rezulto ĉe 4 estis tre bona, 6 bona. Kiel ekzamena komisaro funkciis Dr. Pitlík. El la gekandidatoj 8 absolvis la „ŝtatan“ kurson de Ĉs. Esperanto-Instituto.

**Wien-Bratislava,** interurba vizito. La Esperantista Unio en Wien aranĝis karavanon por viziti Bratislavon. Ĝi venis la 23. IV. per ŝipo (50 p.), estis atendata en la haveno de respektinda nombro de la Bratislavaj esperantistoj kaj poste gvidita tra la urbo por vidi la stratojn kaj la panoramojn. La procesio, sekvanta verdan flagon alte flirtantan, nombris pli ol 200 homojn. Regis bonega humoro kaj amika kompreno. S-oj konsilisto Frey kaj redaktoro Hovorka uzis la ekskurson por priparoli kun la prezidanto de ĈAE kaj la lokaj esper. funkciuloj diversajn temojn, gravajn por la movado en la ambaŭ najbaraj landoj. La karavano revenis Vienon per la ŝipo je la 16-a horo.

**II-a Internacia Libertempejo en Lázně Bělohrad.** Por la bone preparita entrepreno montriĝas intereso en- kaj eksterlande. Ĉiu povas ricevi senpage 20-paĝan ilustritan broŝureton pri I. L. ĉe Esperantista Rondeto en Lázně Bělohrad.

**Esperantaj disaŭdigoj el Brno.** ĈAE varme rekomendas aŭskulton de la regulaj esperantaj sendoj el la stacio Brno, kiuj okazas ĉiusabate je la 17·50—18 horo. Post aŭskulto danku la stacion. Atentigu pri la esperanto-sendoj ankaŭ viajn eksterlandajn amikojn.

**I-a Landa katolika esp. kongreso en ČSR.** La jarkunveno de la Asocio de katolikaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakujo kaj Klubo de katol. esperantistoj en Praha la 27. IV. 1933 decidis aranĝi la 30. VI.—2. VII. 1933 la I-an landan esp. kongreson en Praha.

---

## LOKAJ INFORMOJ.

**Raporto pri funkciado de Esperantista klubo en Praha.** La 24. II. 1933 okazis ĝenerala kunveno. En ampleksa raporto sekretaria speguliĝis la tutjara laboro de Klubo. Sekvis raportoj, de kasisto s-o Hromada, de bibliotekisto, revuisto, arĥivisto kaj ekskurs-estro. Specialan raporton pri kursoj prezentis vicprezidanto s-o Fr. Staněk. Por meritplena lia laboro sur tiu ĉi kampo donacis al li prezidanto en nomo de ĝener. kunveno „Plenan vortaron de Esperanto". Kiel prezidanton oni reelektis s-on Šustr. Nova komitato konsistas jene: vicprezidanto Fr. Staněk, sekretarioj: V. Andršt kaj J. Kośler, kasisto R. Hromada, bibliotekisto M. Staněk, arĥivisto J. Boháč, revuistino I. Rabi, protokolistino A. Tarantíková. Fine de la kunveno estis akceptita rezolucio, kiu rekonante signifon kaj gravecon de ĈAE, kun plezuro konstatas, ke granda plimulto de la membraro estas organizita en ĈAE. Al tiuj, kiuj ankoraŭ ne estas membroj de ĈAE, estas aliĝo varme rekomendata kaj la komitato estas komisiata ekzameni eblecon de kunigo de ĈAE kaj kluba kotizoj. — La 7. III. prezidanto de la klubo prezentas sian ampleksan programon por la nova administrajaro kaj admonas membraron al insista kunlaboro. — La 10. III. pola esperantisto Dro Henryk Żerebillo-Broder paroladis pri la stato de Esperantomovado en Polujo. Vigla debato sekvis. — La 17. III. profesoro K. Urban paroladis pri Parizo kaj Universala kongreso. Parolado estis akompanata per lumbildoj kaj trovis dankemajn aŭskultantojn. — La 24. III. prezidanto de la klubo detale raportas pri okazinta ĝenerala kunveno de ĈAE en Hradec Král., kaj dankas ĉiujn, kiuj en tiom impona nombro (18 personoj) veturis al Hradec. Dum la ĝen. kunveno sekve de tio estis Praha reprezentata per la plej granda nombro de ĈAE-anoj! — La 31. III. paroladis s-o M. Weisskopf pri Leipziga foiro. Vere interesa kaj instrua tiu ĉi parolado transportis la klubon en sferon pure komercan. Poste pri priparolita temo evoluiĝis vigla debato. Fine de la kunveno la prezidanto rememoras prezidanton de Esp. Akademio s-on J. M. Warden, pri kies morto raportas esp. gazetoj. — La 4. IV. okazis la unua komitata kunveno, kiu pritraktis la eblecon de invito al Kola Ajayi, negro-esperantisto, kaj plie kelkajn gravajn interne-klubajn aferojn kaj decidis okazigi eksterordinaran ĝener. kunvenon de la klubo por prezenti al membraro kunigon de ĈAE kaj klubaj kotizoj. — La 7. IV. s-o Šustr informas pri aktualaĵoj kaj parolas pri „Kurioza gazeto", kies kompletan kolekton li samtempe prezentas. Ĝi estas gazeto „La esperantisto", kies la unua kaj la dua numeroj aperis en Kolombo (Ceylono), la tria en Arabia Maro, la kvara en Golfo de Adeno, la kvina en Ruĝa Maro, la sesa en Port Said kaj la lasta numero ie en Maro Mediteranea. — La 28. IV. eksterordinara ĝenerala kunveno per ĉiuj voĉoj akceptis la proponon de la komitato altigi la kluban kotizon je 30 Kĉ; ĉiu membro de la klubo estos samtempe membro de ĈAE. — La 5. V. parolado de prof. Kl. Urban: Japanujo, Ĉinujo kaj ekonomia stato en ekstrema Oriento. Sekvis vigla disputo.

**Praha.** Esperantista klubo en Praha aranĝis la 20. V. 33 en la salono de Ústřední městská knihovna lumbildan paroladon de negra samideano Kola Ajayi antaŭ 200 ĉeestantoj. La enkondukon kaj tradukon bone prizorgis klubestro s-o Šustr. La parolado estis tre interesa kaj plaĉis al ĉiuj. Same plaĉis la kantoj de Joruba-gento, kiujn samtempe K. A. akompanis per ludo sur afrika tambureto kaj la 21. V. je la 22·15 horo ripetis en radio de Praha, kie ĉeĥlingve interpretis Dr. Pitlík. La radioprezentado estis dissendita de ĉiuj ĉeĥoslovakaj stacioj.

**Praha.** *10-jara fondiĝa datreveno de la klubo de katolikaj esperantistoj en Praha.* La 18. V. 1933 festis la klubo de katolikaj esperantistoj en Praha sian 10-jaran fondiĝan datrevenon. F-ino Dandová, malferminte la kunvenon en la nomo de neĉeestinta prezidanto, malhelpata ĉeesti pro necesa forveturo, raportis pri la 10-jara agado de la klubo (kursoj, diservoj, aranĝo de la XIV-a internacia katol. kongreso en Praha 1929 k. a.). Gratulis Dr. Pitlík (por ĈAE, ĈEI), O. Ginz (UEA), skribe Cseh-Instituto, SOĈNE, Polica grupo, E. K. de Praha, f-inoj Šupichová, Dlouhá k. a. Al la prezidanto helpepiskopo Dro Eltschkner, kiu metis en sian episkopan blazonon esp. stelon, estis sendita salutletero.

**Praha.** Loka grupo de germanlingvanoj „Verda Stelo" havis la jarkunvenon la 21. I. 1933. Estis elektitaj prez. MUDr. A. Bischitzky, vicprez. Dr. L. Goldberger kaj Dr. K. Steiner, sekretario Hans Moder. Kunvenoj okazas daŭre en kafejo Urban ĉiun ĵaŭdon.

**Rondeto de esperantistinoj en Praha** decidis en sia ĝen. kunveno, okazinta la 25. IV. 1933 disiĝi pro manko de anoj.

**Bílina.** Kurson por komencantoj, dum vintra sezono 1932-3 aranĝitan de Urba kleriga komitato, gviditan de E. Pfohl, partoprenis 25 personoj.

**Cvikov.** Kurson de la Loka kleriga komitato dum vintro 1932-3 gvidis s-o Taubmann. Jarkunveno la 13. II. 1933 elektis prez. Kurt Hübner, sekretario St. Kunte.

**Děčín-Podmokly.** Jarkunveno de la grupo okazis la 15. II. dum ĉeesto de 17 p. Estis reelektita prez. Hans Klinger, sekretario Hans Roppert.

**Freudenberg.** Kurso por komencantoj depost la 8. III. por 10 personoj.

**Košice.** Slovaklingvaj propagandaj cirkuleroj ciklostilitaj estis eldonitaj de la Esperantista klubo en Košice. Unu rekomendas aliĝon al ĈAE, la dua aĉeton al diversaj libroj kaj esperantaĵoj.

**Karvinná.** La 9. IV. okazis sukcesa parolado de nigra esperantisto s-o Kola Ajayi, negro el Nigerio. Parolado akompanata per lumbildoj plaĉis same kiel kantoj, kiujn s-o Ajayi kantis en sia gepatra lingvo. Ĉeestis proksimume 500 homoj. — 10. IV. okazis dua parolado por lernejinfanoj. Ĉeestis ĉirkaŭ 1000 infanoj.

**Krnov.** La kursfino estis solenigita la 13. II. en kunveno de 50 gesamideanoj. La kursgvidinto W. Tandler konstatis, ke estas 20 fidelaj kursfinintoj.

**Liberec.** Bohemsaksa distrikta kunveno okazis dimanĉon, la 26. II. kun 26 p. Je fraŭlina alvoko, ke la gepatroj eduku siajn infanojn je bravaj esperantistoj, apeftis, ke inter 26 partoprenantoj estas gepatroj sume de 11 infanoj, do infanmanko ankaŭ ĉe la verda popolo!

**Mariánské Lázně.** Kurson de la Distrikta kleriga komitato en la vintra sezono 1932-3 gvidis f-ino Inge Schneider, instruistino.

**Nový Bohumín.** Depost du jaroj laboras tie ĉi kun sukceso s-oj J. Raszka kaj A. Kermel. En la j. 1932 okazis 2 kursoj, en la j. 1933 estas 3 kursoj, la unuan partoprenas 7 skoltoj, la duan 14 plenaĝuloj diverslingvaj, la trian 23 fervojistoj.

**Písek.** En ekspozicia foiro dum somero 1932 estis Esperanto-stando aranĝita de s-ino Uhrová-Křivancová. En la publikan legejon donacas „Heroldon" la sama fervora propagandantino. Sur ŝia domo pendas granda lada tabulo kun surskribo Mezinárodní řeč Esperanto.

**Radvanice.** Estas nove fondita esperantista klubo „Nova Vivo". Prez. s-o F. Křetínský, sekr. s-o Hanzelka.

**Tisovec.** Meritas enpreson salutletero sendita al nia ĝenerala kunveno. *„En Tisovec, la 18an de marto 1933. Estimataj! Ni junaj esperantistoj de la burĝa lernejo en malproksima slovaka urbeto Tisovec kune kun nia instruisto J. Vítek bondeziras al XIV. ĝenerala kunveno de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista sukcesplenan laboron! Estu certaj, estimataj samideanoj, ke niaj pensoj iras kun nia sinjoro gvidanto kaj ĝojas nin, ke almenaŭ li povas travivi kelkajn belajn horojn inter vi ĉiuj. Vi laboras kaj ĝojas nun kaj kiam venos nia vico, tiam ni laboros same forte kaj energie, kiel vi. Bonsanon al ĉiuj!"* Sekvas subskriboj de 22 infanoj.

**Ústí nad Labem.** Kurson por 35 policanoj gvidis en decembro-januaro 1932-3 prof. A. Eckelt (germanlingve).

---

### Ĉeĥoslovaka numero de Literatura Mondo en eksterlandon.

*Eksterlandaj samideanoj, kiuj ricevis de ĈAE la ĉeĥoslovakan numeron de LM., estas insiste petataj, ke ili baldaŭ donu informon pri ricevo. Kun speciala danko estos akceptita ĉiu gazeto, esperanta aŭ nacilingva, kiu alportis sciigon pri tiu kajero, ankaŭ ĉiu persona rimarko pri la enhavo. ĈAE atendas nun rapidan liveron de tiuj konfirmoj, kiuj estas bezonataj por grava celo. Samideanan dankon bonvolu akcepti la plenumintoj de tiu peto, esprimita jam en cirkulero, kiun aldonis ĈAE al la kajero!*

---

## Ĉu ĉeĥoslovaka antologio aperos en 1934?

Jam delonga deziro estas de ni ĉiuj, kiuj kredas, ke Esperanto havas la rolon konatigi la kulturvalorojn de la malgrandaj nacioj, ebligi eldonon de Ĉeĥoslovaka antologio. Post la sukceso de la ĉsl. numero de Literatura Mondo AELA estus preta kun konsento de ĈAE-komitato eldoni ĉsl. antologion. Tamen restas unu kondiĉo por povi realigi la supran planon: la AELA-membraro balotos pri la venontjaraj libroj antaŭ la *15. julio 1933*, kaj aŭskultinte la baloton de la plimulto de tiuj membroj, kiuj aliĝis *antaŭ* la 1-a julio por *tiu ĉi* aŭ por *venonta jaro*, AELA agos laŭ la decido de la plimulto. Kompreneble, se inter la membroj estos multaj ĉeĥoslovakoj aŭ multaj ŝatantoj de la ĉeĥoslovaka kulturo, la eldono de la verko efektiviĝos kaj per tio vere granda nombro de esperantistoj ne nur konos, sed ankaŭ konatiĝos nian kulturon. La baldaŭa eldono estas do en la manoj de la literaturemaj kaj legemaj esperantistoj. Kaj kiu dubas pri tio, ke tiaj ekzistas en nia lando? Ni do kredas, ke ĉiuj, kiuj ŝatas la esperantan literaturon kaj volas, ke ni ĉeĥoslovakoj, estu tie inde reprezentitaj, esploros, *kion fari por plej bone ebligi tiun eldonon.*

*Nia konsilo: Aliĝu al AELA* antaŭ la 1-a de julio kaj uzante vian rajton, *balotu kiel unu el la libroj:*
Ĉeĥoslovakan antologion! R. H.

---

## PORMEMBRAJ INFORMOJ.

**La Bulteno** estas sendata senpage al ĉiuj niaj membroj. Ni sendas ĝin al ĉiuj pagintaj kotizon por 1932 aŭ 1933. Kiuj ne pagis ankoraŭ por 1933, havu la afablecon kaj sendu la kotizon da 16 Kč per la aldonita pagilo. Kompreneble tio koncernas la membrojn senperajn (t. n. izolulojn). Por membroj de la Kluboj, kiuj aliĝis korporacie, pagas iliaj kluboj. Tiuj ĉi kaj la membroj jam pagintaj ne perdu la pagilon, sed konservu ĝin por alia uzo, ekz. donaco al nia Oficeja fondaĵo aŭ mendo de libroj, propagandiloj k. s. Neniu pagilo perdiĝu, ni akceptas dankege la plej malgrandajn donacojn!

**La VI-a kongreso de jugoslavaj esperantistoj**

okazos la 4.—5. V. 1933 en Beograd sub la protekto de prezidanto de Serba reĝa akademio de sciencoj, al kiu estas ĉeĥoslovakaj esperantistoj kore invitataj. Partoprenantoj ĝuas senpagajn vizon kaj kongreskarton, 50% rabaton sur jugoslavaj fervojoj. Detala programo de la kongreso aperis en maja numero de gazeto „La suda stelo". Adreso de la K. K.: Jugoslavia Esperanto Ligo, Beograd, Hotel London.

**Ĉeĥoslovakaj esperantaĵoj al Svedlando.**

Esperantoklubb, Pusterviksgatan 15, Göteborg, Svedujo aranĝos dum nuna somero internacian esperanto-ekspozicion laŭ iniciato de Popolkleriga asocio. La ĉeĥoslovakaj esperantistoj estas petataj sendi al supra adreso esperantaĵojn, kiujn ili konsideras por tiu ĉi celo taŭga. Rekompence ĉiu ricevos interesan sendaĵon.

**Ĉeĥoslovaka „vespero" en Francujo.** Neŭtrala esperanto-grupo en Dunkerque aranĝis la 25an de majo ĉeĥoslovakan esperantan „vesperon".

**Interkonsento de Ĝenevo 1933.** La 22. V. s-oj Stettler, prez. de UEA, Schools, sekretario de KR, kaj delegitoj Goldsmith, Dubois, Kreuz kaj Steiner, kunvenintaj en Ĝenevo por prepari la vojon al interkonsento pri internacia organizo, starigis planon, laŭ kiu Universala Esperanto-Asocio estus tutmonda organizaĵo esp., reprezentanta la esp. movadon kaj organizanta la universalajn kongresojn. UEA-on gvidus komitato, konsistanta el reprezentantoj de la naciaj societoj. (Fakaj societoj kaj institucioj povus enskribi sin ĉe UEA kontraŭ fiksita jarpago.) Dum la kongreso kunsidus „Konsilantaro de la esp. movado", kiu pritraktus la staton kaj programon de la esp. movado kaj decidus deziresprimojn, transdonotajn al la komitato de UEA. La detala plano estas submetota al la komitato de la ĝisnuna UEA kaj pere de KR al la opaj naciaj societoj. La nova aranĝo ekfunkcios tuj, post kiam la komitato de UEA kaj 12 landaj asocioj ĝin akceptis. Post likvido ICK kaj KR transdonus al UEA siajn havaĵojn kaj dokumentojn.

---

## NIAJ MORTINTOJ.

Laŭ reveno de la Bulteno ni eksciis pri la morto de jenaj samideanoj:

s-ro *Karel Bartoš* en Volfířov,

s-ro *Jaroslav Pokorný* en Zastávka u Brna,

s-ro *Josef Pumr* en Hradec Králové.

Al iliaj parencoj ni sendas esprimon de la kora kompato.

---

LA PROGRESO eldonis la 5-an de majo la 1-an numeron 16-paĝan kun riĉa enhavo. Kunlaborantoj: V. Echtner, O. Ginz, R. Hromada, Dr. Kamaryt, M. Lukáš, Jul. Šupichová, Jar. Šustr k. a. La 2-a n-ro jus aperis. Specimenan numeron senpage sendos la administracio de La Progreso, Praha VII., Sochařská 2.

---

LIGILO, monata esperanta revuo, enhavas mallongajn literaturaĵojn, daŭrajn rubrikojn: UEA, Movado, Societoj, Lingvo, Virinoj k. a. krom speciala literatura aldono. Abonpago 15 Kč. Red. kaj adm. Prostějov, Masaryk. nám. 33.

---

RÁDCE ČESKÉHO ESPERANTISTY estas broŝuro de faka instruistino Julie Šupichová, kiu vin kaj viajn amikojn konatigos en formo de demandoj kaj respondoj pri deveno, organizo, literaturo, lernilo kaj pri praktika apliko de esperanto. La broŝuro estas ankaŭ bona helpilo por kandidatoj al la ŝtataj ekzamenoj pri esperanto. Mendu por 2·30 Kč ĉe aŭtorino Julie Šupichová, Praha, konto de poŝta ŝparkaso n-o 16.879.

---

**Ĉeĥoslovaka numero de Literatura Mondo** estas unu el la plej plaĉaj esperantaj eldonaĵoj. Valora enhavo — traduko de elektitaj ĉeĥaj kaj slovakaj prozaĵoj kaj poemoj — kaj luksa aranĝo — trikolora kovrilo kaj multaj ilustraĵoj. — Plej konvena donaco por via eksterlanda amiko. Prezo 6 Kč afrankite. Estas haveblaj kelkaj kajeroj presitaj sur plej bona kreta papero po 8 Kč. Mendu rapide en la oficejo de ĈAE!

---

**AELA — Asocio de esperantistaj libroamikoj** donas al siaj membroj por prezo mirinde malalta plej valorajn verkojn. Pagante la sumon de 140 Kč, en partopagoj iom pli altan, vi ricevos dum la jaro 1933 afrankite 6 librojn, kies vendoprezo estas 395 Kč. La unua jam aperinta verko Hungara Antologio, volumo 480 paĝa, estis renkontita de plej favora kritiko tutmonda. El la ceteraj libroj de la serio speciale estas citota Esperanta enciklopedio, ĉefverko de nia literaturo. Ĉiujn detalojn donas kaj aliĝojn akceptas ĈAE.

---

Duonmonata Esperanto-Roman-Gazeto, aperados de post Julio kaj enhavos precipe mallongajn romanojn originalajn kaj tradukitajn en modela stilo. La specimena numero jam nun senpage havebla ĉe: Esperanto-Verlag, Wilms-Str. 5, Berlin SW 61.

---

## KORESPONDADO.

*Rusa inĝeniero, 35-jara, deziras korespondi. Precipe ŝatas muzikon, por muziknotoj rekompencas laŭ deziro. U.S.S.R., MOSKVA, ĉefa poŝtoficejo, Poŝtkesto 481, Margarit Tudorowskij.*

Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz čsl. esperantistů v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík.
Tiskne A. Pražák, Jablonné n. O. — Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102.047-VII-1933.